



№ 111, marto 2020
ELDONO DE RUSIA ESPERANTISTA UNIO (REU)

MESAĜO DE UEA OKAZE DE INTERNACIA VIRINA TAGO, 8 MARTO 2020

Universala Esperanto-Asocio salutas la virinojn de la mondo, precipe la anojn de la Esperanto-komunumo, okaze de Internacia Virina Tago 2020. Parolantoj de la Internacia Lingvo Esperanto, same virinoj kiel viroj, troviĝas en ĉiu angulo de la mondo. En sia rolo kiel internacia lingvo laboranta por rekta kaj nefiltrita dialogo inter la civitanoj de la mondo, Esperanto unike situas por ĉie helpi virinojn interkomunikiĝi trans la bariloj de distanco kaj lingvo, interŝanĝi vidpunktojn kaj ideojn kaj organizi sin ĉiuloke por agado subtene al virinoj.

Ni rekonas, ke multo farendas: egala kompenso por egala laboro, aliro al edukado, adekvataj sanservoj, jura egaleco, egala klerigo por knabinoj kaj knaboj – la listo longas. El inter tiuj infanoj kiuj havas aliron al edukado, tro multaj knabinoj frue forlasas la lernejon, antaŭ ol ili povas evoluigi la proprajn lertojn aŭ pretigi sin por karieroj. Kvankam Unuiĝintaj Nacioj atingas progreson, precipe per Tagordo 2030 kaj ties Celoj por Daŭripova Evoluigo, kreskantaj problemoj pro klimatsanĝiĝo, dislokiĝo, militagado kaj epidemioj subfosas tiun progreson – kaj estas eviteblaj. Bezonataj estas pli da dialogado, pli da preteco kompromisi, pli da interkompreniĝo, inter homoj kaj registaroj ĉie. Ni parolu la lingvon de la paco.

–Veraj ŝanĝoj,” laŭ Unuiĝintaj Nacioj, –estas dolorige malrapidaj por la plimulto de virinoj kaj knabinoj de la mondo. Hodiaŭ eĉ ne unu lando povas pretendi, ke ĝi atingis genran egalecon.” Ĉeĥjma kaj publika perforto kontraŭ virinoj daŭras, same kiel rezisto al feminismaj sukcesoj. –Venis la tempo,” diris Ĝenerala Sekretario António Guterres lastatempe –ĉia ni ĉesu klopodi ŝanĝi virinojn kaj komencu ŝanĝi la sistemojn kiuj malhelpas ilin atingi sian potencialon.”

UEA rekonas kaj honoras la gvidan rolon de virinoj en movadoj por lingva kaj kultura revivigo, kaj por ŝirmi la endoman sferon kontraŭ subpremo kaj diskriminacio. Tiaj iniciatoj formas esencan parton de la strebado starigi mondon kie multaj kulturoj kaj lingvoj povu harmonie kunekzisti, kaj kie vera genra egaleco realiĝu.

Sekve, ni esprimas nian solidarecon kun movadoj por forigi diskriminacion kontraŭ virinoj kaj knabinoj kaj krei daŭripovan estontecon kiam ĉiuj homoj traktiĝas kun egalaj atento kaj respekto, sendepende de lingvo, kulturo, genro kaj aliaj formoj de diverseco.





Apero-14 kaj la 25-jariĝo de MASI

La 24an de januaro Moskva Esperanto-Asocio MASI iĝis 25-jara. Kvaronon da jarcento antaŭe ambasadoro de Hungario Gyorgy Nanofsky, en ĉeesto de la rektoro, instituta administraro kaj dekoj da studentoj-esperantistoj, distondis ruĝan rubandon en la biblioteka salono de Moskva aŭtomobilkonstrua instituto (MASI), simbolante aperon de nova esperantista kolektivo — Moskva Amikaro de Studentoj kaj Instruantoj (MASI). Ekde tiam senlace, seninterrompe kaj sukcese MASI laboras por Moskva kaj Rusia Esperanta Movado: popularigas Esperanton, instruas ĝin, organizas Esperantajn eventojn, vojaĝas per kaj por Esperanto. Ĝiaj agadoj, kiel teatraĵoj, lingvaj festivaloj, Esperanto-Poŝtkruciĝo, gazetaj artikoloj ktp estas konataj ankaŭ eksterlande.

Okaze de MASI-naskiĝdato la kolektivo ĉiujare organizas eventon kun la nomo APERO (Antaŭprintempa Esperanto-Renkontiĝo). Ĝia komenca ideo estis lingva mergiĝo por finintoj de parola Esperanto-Kurso FaRo ("Faru la Rondon!"), pasanta kun partopreno de ne nur komencantoj, sed ankaŭ spertaj esperantistoj — por kreo de natura Esperante parolanta medio. Nun la evento akceptas ĉiujn homojn, kiuj pretas gardi la lingvan disciplinon, ne krokodilante.

Impresoj pri APERO

La 21-an–24-an de februaro en pensiono «Jerŝovo» apud Zvenigorod pasis APERO — tradicia printempa aranĝo de Moskva Esperanto-asocio MASI. «APERo» deĉifriĝas kiel Antaŭprintempa Esperanto-renkontiĝo kaj okazas ĉiujare dum la februaraŭ aŭ martaj festoj. Ĉi-foje la aranĝo havis temon «Jubileoj», ĉar jubileas la faranta ĝin organizo: MASI 25-jariĝas. Do, laŭ la temo, multaj programeroj estis ligitaj kun iuj jubileoj. En sufiĉe vasta senco: ekzemple, en la programo estis teatraĵo «La kanto de l' kato», dediĉita al la dekmiljara jubileo de malsovaĝiĝo de katoj.

Mi preterlasis la unuan tagon kaj atingis la bazejon profundnokte. La dua tago de la renkontiĝo kaj la unua tago por mi komenciĝis de matena gimnastiko, gvidata de Tatjana Glaznica, kiun mi plezure partoprenis. Rara evento: kutime mi dormas dum gimnastikoj. Sekvis matenmanĝo kaj poste mia propra programero «La centjara datreveno sur la sojlo de 30-jariĝo». Mi skize rakontis pri historio de la landaj Esperanto-organizoj en Rusio kaj Sovetunio. Ja meze de la sekva, 2021-a jaro nin atendas la 100-jara jubileo de la fondo de SEU. Kaj la 28-an de decembro 2021 jubileos ĝia posteulo REU, kiu iĝos 30-jaraĝa.

Poste okazis la plej ĉarma programero — kontakta improvizo-dancado, kiun organizis Lena Alopina. Estis tre ĝua afero! (kiel ĝenerale apero de Lena en APERO :)).

Posttagmanĝe ni promenis tra la vasta pitoreska teritorio de la bazejo. Necesas diri, ke APERoj pasas en la ripozejo «Jerŝovo» apud Zvenigorod. Tie estas multaj lagetoj, bien-stilaj domoj, sportejoj kaj tiel plu. Okazis serio de komunaj fotadoj apud statuoj kaj en speciale belaj lokoj.



Kronis la tagon poezia vespero «Krono de la rusa poezio», kiun preparis kaj gvidis Ludmila Novikova.

Dum la tago pasis ankaŭ kelkaj prelegoj. La mian mi jam menciis, el alies prelegoj memorfiksiĝis tiu de Nikolaj Gudskov pri la Universala homo I. Asimov kaj tiu de Ilja Gnsarjov kun provoka titolo «Mikaelo Bronŝtejn — ĉu nia ĉio?».

La trian tagon oni komencis de tradukistaj konkursoj, daŭrigis per prelegoj (ekzemple, la dua prelego de Nikolao «100 jaroj de neneŭtrala Esperanto. Renkonte al la 94-a SAT-kongreso» kaj prelego de Irina Gonĉarova pri historio de MASI) kaj finis per iom pelmela festeno, dediĉita al 25-jariĝo de MASI.

Ĉi-jare havas jubileon kara por multaj el la partoprenantoj homo — Ĵomart Amzejev. Kaj iumomente APERanoj videoregistris komunan filmeton-gratulon por li. Pro la sprita scenaro de la filmeto oni devas multe danki Sergeon la Teruran el Rigo.

La lasta tago estis malapera, ĝi havis la programon nur ĝis la tagmanĝo. Plejparte tio estis ludoj, ekzemple «Kunigramoj» de Mikaelo Povorin kaj kvizo pri Vasilij Jeroŝenko de Julija Ŝkarban. La kvizon gajnis la gastino el Jekaterinburg Raja Kudrjavecva.

La aranĝon entute partoprenis 38 homoj, kiuj egale disdividiĝis je 19 inoj kaj 19 viroj. Plej multis, kompreneble, moskvanoj kaj apudmoskvanoj, sed estis ankaŭ gastoj el 12 pli foraj urboj, inkluzive el la malproksima Barnaul.

Tiu ĉi APERo estis la 14-a. La sekva havos la numeron 15, la ĉeftemon «Tradicioj» kaj okazos tradicie dum printempaj festoj — februaraŭ aŭ martaj — sekvajare. Bonvenon!

Aleksandr Lebedev



STATISTIKO de la APERo-14

Partoprenis entute 37 homoj:

inoj – 18, viroj – 19, suĉinfanino – 1;

MASlanoj – 20, fluparolantoj – 30, unuafojaj partoprenantoj – 12.

Urboj:

Moskvo – 14,

Moskva regiono – 5,

Penza – 3,

Murino – 3,

Jekaterinburg – 2,

po 1 – 9 (Arhangelsk, Barnaulo, la Granda Novgorodo, Ivanovo, Novoĉerkassk, Rigo, Samara, Vladimir, Volgogrado).



APERo pri jubileoj

Ĉi-jare la tradicia aranĝo de MEA MASI –Antaŭprintempa Esperanto-Renkontiĝo” (APERo-14) havis la temon –Jubileoj” — ĉar la asocio-organizanto la 24-an de februaro 2020 atingis sian 25-jariĝon. La programo estis — cetere, kiel ĉiam — abunda, kaj foje iuj prelegoj kaj prezentoj okazis paralele. Nu, tio estas bona — ja oni povis elekti ion pli interesan por si!

La temo donis multajn eblecojn, kaj la homoj prezentis kaj perceptis informojn pri ĉiuspecaj jubileoj de tute malsamaj homoj kaj organizoj — komponistoj Johann Strauß kaj Frederic opin, reĝisoro Federico Fellini, verkisto kaj populariginto de la scienco Isaak Asimov, poeto Iosif Brodskij ktp., ktp. Eĉ prezento de –proza poemo”

far Ilja Gnuŝarjov –Kanto de l’ kato” estis prezentita de la aŭtoro kun dediĉo al la stranga jubileo: dekmiljariĝo de la hejmigo de la kato! Estis kvizoj pri 130-jariĝo de Vasilij Eroŝenko, 200-jariĝo de malkovro de Antarktido kaj eĉ pri 30-jariĝo de McDonald’s en Moskvo. Ĉiuj prezentoj estis minimume interesaj, iuj — altnivelaj.

Krom tio, estis aranĝoj, ne rilataj al la ĉefa temo, sed tre gravaj, kiel elpaŝoj de niaj bonaj artistoj Segeo Straŝnenko (u. Rigo) kaj Mikaelo Povorin (u. Moskvo), konkursoj de Povorin pri kreitaj de li tre komplikaj rebusoj, dancadoj, promenado en la pitoresta parko de la bieno kaj ceteraj eventoj, kiuj beligis la programon.

Pro la bona teknika akompano de la tuta aranĝo nepre dankindas Aleksandr Basov. Sen liaj zorgoj nenio pasus tiom glate kaj perfekte.

Tamen, mi volas aparte noti la kvar programerojn, kiuj estis kernaj por la enhavo de tiu ĉi APERo.

Unue, tio estis du prezentoj, kiuj koncernas gravajn jubileojn de la movado, okazontaj sekvontjare: 100-jarajn datrevenojn de SEU kaj SAT. Dediĉe al la unua estis prezentita zorge preparita skizo de la prezidanto de REU Aleksandr Lebedev, dediĉe al la dua — prelego de Nikolao Gudskov, kun speciala atento pri tio, ke sekvajare en Moskvo devos okazi la 94-a SAT-kongreso.

Due, estis brile preparita de Ludmila Novikova koncerto pri la rusa poezio, en kiu sonis poemoj de la poetoj, havantaj jubileojn ĉi-jare: Afanisij Fet, Aleksandr Blok, Boris Pasternak, Sergej Jesenin ka. La tradukoj estis plejparte novaj, faritaj de Ludmila mem, kaj plenumis ilin kaj ŝi, kaj aliaj homoj. Kelkaj poemoj, fariĝintaj kantoj, sonis kun muzika akompano de Sergeo Straŝnenko kaj Oksana Zvereva. Rava programero.

Kaj la tria prezento, kiun mi volus speciale noti, estis prezentaĵo de Irina Gonĉarova –Paĝoj el MASI-historio”. Ŝia rakonto koncernis ankaŭ la antaŭhistorion, kiu estis ligita al kunlaboro kun AIS San-Marino kaj profunda intereso de gravaj profesoroj el MASI/MGIU pri Esperanto. Ĉefe temis pri diversaj iniciatoj kaj aranĝoj, kiujn efektivigis MASI dum kvaronjarcento, kaj pri agado de elstaraj MASlanoj dum diversaj etapo de la ekzisto de la klubo-asocio: Anatolij Ŝejpak, Polina Belova, Jekaterina Bebenina, Vitalij Malenko, Olga Ĉerņyŝova, Valentina Sidorova, Alla Kudrjaŝova, Aleksandr Sigaĉov, Kirill Grustnjov, Natalja Nikolajeva, Svetlana Ŝiŝkina, Julia Samsonova ka. La rakonto, en kiu multaj eventoj estis eĉ ne menciitaj, montris, kiun gravan kontribuon por Rusia movado faris tiu organizaĵo sub gvido de Irina. Ĉesto de kelkaj malnovaj MASlanoj, kiuj antaŭ 25 jaroj agis kun Irina dum la unuaj paŝoj de la organizaĵo – Oksana Zvereva, Roman Bolŝakov, Oleg Ĉajka — reliefigis la –historiecon” de la jubilea rakonto.

Kronis la festotagon bankedo, organizita de Raja Kudrjavceva (u. Jekaterinburgo), kun multaj bongustajtoj, donacoj, tostoj, kantoj kaj bondeziroj...

MASI-historio nepre devus esti surpaperigita kaj publikigita; en formo de kolekto de rakontoj pri apartaj eventoj ĝi estus ne malpli interesa kaj edifa, ol –Legendoj pri SEJM” far M. Bronŝtejn. Komprenoble, por Irina estas pli interese elpensi kaj aranĝi ion novan, sed tia libro de rememoroj estus ankaŭ tre grava por evoluigo de la movado, okazigo de novaj aranĝoj!

Nikolao Gudskov



APERo-15 – 20-23.02.2021 Temo: TRADICIOJ

Unu leciono pri Esperanto por lernantoj en Surguto

La projekto "Unu leciono pri Esperanto por lernantoj" komenciĝis la 1an de septembro kaj formale finiĝis la 31an de oktobro 2019. Tamen fakte jen tie, jen alie okazas eventoj, plene kongruaj kun la celoj de la agado. Ni traktu ilin punta parto de la projekto, kiu ja revenos al ni en septembro-oktobro-2020.

Dum tiu ĉi punta periodo jam okazis tri eventoj. Du pasis decembre-2019: la 4a Lingva Festivalo en Samara instituto de Kulturo kaj aro de lecionoj por studentoj de la Orenburga filio de Rusia universitato de nafto kaj gaso far' de Tatjana Kaminina.



Komence de februaro 2020 okazis la tria evento en meza lernejo de Surgut. Pri ĝi informas VK-paĝaro "Esperanto en Surgut" <https://vk.com/club59616356>.

Informa prelego pri Esperanto

La unuan de februaro 2020 Vladimir Opletajev estis invitita gasto de la meza lernejo 32 en Surguto, kie li prezentis Esperanton al ĝelernantoj de la 11-a klaso. La abiturientoj lernas la anglan lingvon, la informa prelego estis okazigita laŭ la iniciato kaj peto de ilia instruistino Jelena Tanĉuk. La renkontiĝo de lernejanoj kun esperantisto estis programero de la lerneja studtema semajno de fremdaj lingvoj. La informa raporto kaj ligita kun ĝi posta konversacio atentigis partoprenantojn pri diversaj aktualaj lingvaj problemoj kaj pri la baldaŭa Internacia tago de la gepatra lingvo.

Vladimir Opletajev

Jarkalendaro kiel fonto de inform-motivoj por popularigi Esperanton

21. marto – Tutmonda tago de poezio

La Tutmondan tagon de poezio oni festas la 21an de marto. Tiu ĉi festo estis proklamita la 15an de novembro 1999 de la 30a Ĝenerala konferenco de Unesko. La tradicio estas sufiĉe nova, unuafoje oni poeziumis feste en Parizo la 21an de marto de la 2000a jaro. Sed origine ideon pri la okazigo de poezia festotago donis usona poetino el la ŝtato Ohio Tessa Sweazy Webb, kiu en 1938 iniciatis poezian feston la 15an de oktobro en la naskiĝtago de la granda romia poeto Vergilio. Al la tradicioj de la festo apartenas premio de talentaj poetoj, literaturaj vesperoj, publikaj deklamadoj de poeziaj verkoj, kunvenoj de poeziŝatantoj, okazigo de ekspozicioj, prezentadoj de novaj libroj, poeziaj spektakloj, televidaj programoj pri vivo kaj verkaro de famaj poetoj, konferencoj de legantoj, poeziaj klubkunvenoj, kreaĵ metiejoj ktp.

Per ĉi tiu tago estas emfazata grandega eduka kaj estetika roloj de literaturo kaj poezio en la kultura vivo de homoj. La poezia festo celas interesigi homojn pri poeziaj verkoj kaj poezia verkado, ebligi al junaj kaj novaj poetoj kontinuan lertiĝadon kaj sukcesan atingon de Parnasaj altaĵoj. En la solenaĵoj partoprenas poetoj, ŝatantoj de poezio, filologoj, redaktoroj, ĵurnalistoj, tradukistoj, universitataj lektoroj, instruistoj, kritikistoj, studentoj, lernantoj – homoj de ĉiuj aĝoj, kiuj interesiĝas kaj okupiĝas pri poezio.

Lastatempe ankaŭ esperantistoj pli aktive integriĝas al programoj de poeziaj kaj literaturaj aranĝoj, kiuj okazas ekster tradiciaj aktivajoj de esperantistaj kluboj. En la lasta periodo en multaj urboj de Rusio fariĝis popularaj kontaktoj inter esperantistaj kluboj, apartaj esperantistoj kaj bibliotekoj, serĉantaj novajn formojn de kunlaborado kun legantoj. Laŭ aktualaj agadkonceptoj bibliotekoj estas nun ne plu nuraj liverantoj kaj perantoj de presaĵoj kaj periodaĵoj, ili pretendas esti kulturejoj, kiuj kunigas kaj aktivigas homojn de tre diversaj interesoj kaj vigle evoluigas variajn formojn de kluba aktivado. Esperantistoj povas fruktodone eksploati informcele ĉi tiujn favorajn cirkonstancojn kaj oferti al bibliotekaj establoj kaj aliaj publikaj kulturaj institucioj proponojn pri interesaj klerigaj aranĝoj inkluzive de programoj pri literaturo kaj poezio aŭ porokaze aliĝi al programoj, gvidataj kaj efektivitataj de neesperantistoj. En pluraj rusiaj urboj esperantistoj jam listigas pozitivajn rezultojn de tia imitinda kunagado: Ĥabarovsko, Birobiĝano, Krasnojarsko, Barnaulo, Novokuznecko, Jekaterinburgo, Samaro, Moskvo, Tiĥvino kaj multaj aliaj.

Origine Esperanto estis kreata ne nur kiel internacia pontolingvo, uzata por plifaciligi kontaktojn inter homoj, sed ankaŭ kiel literatura lingvo. Ludoviko Zamenhof mem elprovis la aplikeblon de Esperanto por aŭtenta poezia verkado. Printempe de 1887, antaŭ la apero de la Unua libro, li verkis la poemon "Ho mia kor'", kiu fariĝis klasikajo de la originala Esperanta poezio kaj estis elesperantigita en multajn lingvojn. Al la plumo de la Majstro apartenas aliaj originale verkitaj poemoj, Esperantaj tradukoj de klasikaj poeziaj verkoj de Shakespeare, Goethe, Schiller, Heine. La poezia torĉo de Zamenhof estis plu portata de dekoj da elstaraj Esperantaj poetoj, pri kiuj la tutmonda movado por Esperanto kaj la Esperanta literaturo povas plenrajte fieri. Inter nunaj rusiaj popularaj Esperantaj poetoj kaj tradukantoj de poeziaĵoj, kies krea agado rimarkinde riĉigas la internacian kulturon kaj efike peras al la tutmonda legantaro trezorojn de la nacia poezia arto, estas Mikaelo Bronŝtejn (Tiĥvino), Gafur Gazizi (Salavato), Klara Ilutoviĉ (Elektrostalo), Valentin Melnikov (Moskvo), Ludmila Novikova (Moskvo), Mikaelo Povorin (Moskvo), Grigorij Arosev (Moskvo).

La Tutmonda tago de poezio povas esti oportuna preteksto por montri al multaj homoj, apartenantaj al la celgrupo de literaturaj rondoj, Esperanton kiel unikan lingvon de la atentindaj beletraj kaj poeziaj. Informaliroj kaj informengaĝiĝoj de esperantistoj pri ĉi tiu temo posedas tre larĝan spektron, necesas nur pli emfaze kultivi ĉi-tamajn aktivajojn, elekti plej interesajn kaj trafajn formojn de la antaŭenigo de Esperanto.

Vladimir Opletajev

Puŝkin en Esperanto en urba biblioteko

La 10-a de februaro estas la tago de memoro de la fama rusa verkisto kaj poeto A. S. Puŝkin, kiu mortis en 1837 en Peterburgo pro la grava mortiga vundo, ricevita dum la duelo kun la franca oficiro Georges d' Anthes.

Omaĝe al la memoro pri la poeto en la regiona internacia biblioteko de Jekaterinburgo okazis poezia maratono, dum kiu sonis deklamitaj kaj voĉlegitaj verkoj de la genia klasikulo en diversaj naciaj lingvoj. Ankaŭ min la organizantoj de la aranĝo invitis partopreni ĝin en la biblioteko kaj voĉlegi en Esperanto la elektitan de mi poeziaĵon de A. S. Puŝkin. Menciindas, ke la aktiveco de jekaterinburgaj esperantistoj dum la tuturbaj publikaj aranĝoj estis rimarkita kaj dum lastaj jaroj oni regule invitas nin partopreni diversajn kulturajn eventojn kaj projektojn, kiuj okazas en muzeoj, bibliotekoj, dum la programoj de la tuturbaj festivaloj kaj festoj.



Verdire, tio tre ĝojigas min kaj ĉiam mi volonte konsentas kunlabori kaj altiras jekaterinburgajn esperantistojn al tiu aktivado kaj samtempa vasta informado pri nia lingvo. Ankaŭ ĉi-foje mi komence atentigis ĉiujn aŭskultantojn, ke la teksto sonos en la internacia lingvo Esperanto, kiu apartenas al neniu nacio, sed ekzistas por unuigi ĉiujn popolojn de la mondo, kaj nur poste voĉlegis la ŝatatan de mi poemon de A. S. Puŝkin –Ĉu gravas fakte mia nom'?', kiun tradukis de la originalo (—Что в имени тебе моем?") S. Rubljov.

* * *

Ĉu gravas fakte mia nom'?'
Ĝi mortos kiel bru – momento,
Dum ondo plaŭdas en silento,
Aŭ kiel stranga nokta son'.

Ĝi lasos sur memor-foli'
Senvivan signon, kvazaŭ vorton
De tomba skribo – la raporton
Pri la pasinta histori'.

En zorga prozo de la viv'
Ne havas nomo la valoron, –
Ne donos ĝi en efektiv'
Por vi sugestan rememoron.


Sed en malgajo kaj turment'
Alvoku nomon kun sopiro:
Respondos vin amika sent',
Amanta koro kaj admiro...

En la rusa la saman verkon prezentis post mi la membro de la asocio de puŝkinaj kluboj de Jekaterinburgo.

En la programo de la aranĝo estis ankaŭ luda kvizo pri la kreado de la genia poeto, kiun aktive partoprenis ĉiuj tiutagaj diversaĝaj gastoj de la biblioteko: 5-6 grupoj de gelernantoj el urbaj lernejoj, membroj de kelkaj puŝkinaj kluboj, legantoj – reprezentantoj de diversaj naciaj societoj kaj ceteraj partoprenantoj. Ĉiuj legantoj de la poeziaĵoj de Puŝkin ricevis certigilojn pri la partopreno, aparte preparitajn de la organizantoj. Post la programo ĉiuj povis konatiĝi kun la bela speciale aranĝita ekspozicio de libroj, insignoj, bildoj pri A. S. Puŝkin kaj ankaŭ de liaj verkoj.

Raja Kudrjavceva


Informa agado en Birobiĝano



La 09-an de februaro 2020 en la urba biblioteko de Birobiĝano enkadre de renkontiĝo dediĉita al romano de M. Bulgakov –La Mastro kaj Margarita” Eŭgeno Bojĉin rakontis pri tradukoj de la romano en diversajn lingvojn kaj pri Esperanta tradukado de S. Pokrovskij. La romanon S. Pokrovskij tradukadis dum tri jaroj. Tio estis malfacila, sed tre interesa laboro. Post renkontiĝo al ĉeestantoj estis disdonitaj flugfolioj, rakontantaj pri Esperanto. En la renkontiĝo partoprenis dek du personoj.

La 19-an de februaro 2020 en la mezlernejo de urbeto Kulduro Eŭgeno Bojĉin demonstris du filmetojn kaj rakontis pri Esperanto al pli ol tridek gelernantoj de 8-11 klasoj. Eŭgeno rakontis al ili pri eblecoj, kiujn donas Esperanto al loĝantoj de malgrandaj loĝlokoj. Dum la kunveno estis prezentitaj Esperantaj libroj kaj donitaj du Esperanto-lecioj el lernolibro de A. Junusov.


Post interparolo kvin gejunuloj aliris al la propagandisto kaj demandis lin pri Esperanto. Krome, tri lernantoj aliĝis al grupo en VK –Эсперанто в Хабаровске/Esperanto en Habarovsko”. <https://vk.com/esphab>



La 20-an de februaro 2020 en la urba societo de invalidoj –Kubo” Eŭgeno Bojĉin rakontis pri Esperanto kaj pri eblecoj, kiujn povas doni Esperanto al ili.

Ili interesiĝas pri granda vojaĝo de V. Eroŝenko tra multaj landoj. Dum la kunveno estis prezentita unu filmeto, ĉeestis dek kvar personoj. Unu virino tre ekvolis lerni Esperanton por komunikigi kun diversaj landoj.

Eŭgeno Bojĉin



Historio

Internacilingvanoj en restoracio “Internacia”

Fine de 2019 aperis speciala numero de la revuo/almanako «Московское наследие» (130 p.) Ĝi estis dediĉita al historio de moskvaj manĝejoj kaj restoracioj ekde 19 jarcento ĝis nun. En la artikolo pri restoracioj en komenco de 20 jarcento, ĉapitro –Места для «своих»», sur p. 10 legeblas (post sufiĉe longa listigo de lokoj kie kutime kunvenis homoj de certaj profesioj kaj okupoj): «Эсперантисты обедали в особых кабинетах ресторана «Международный» на Тверской улице, где продолжали практиковаться, изучая меню на искусственно созданном языке.»

La revuo havas luksan aspekton kaj probable konsiderindan eldonkvanton (ne indikita), tiu numero estis senpage prenebla en arta ekspozicio en centra Maneĝo novembre-decembre.

Valentin Melnikov



Esperantaj teatraĵetoj en Peterburgo

La 1-an de februaro je la 14-00 en Peterburga Biblioteko n-ro 4, en Babuškina-str, 135, okazis teatra prezento flanke de la amatora Esperanto-trupo. Estis prezentitaj 4 teatraĵetoj en la rusa kaj Esperanta lingvoj. La Esperanto-parto estis "La kvara kandelo". Spektis la laboron de la amatora grupo ĉirkaŭ 15 personoj kun infanoj. Post la prezento estis teumado kun bakitaj kaj porvirina vino. Ni esperas, ke la trupo daŭros labori plu.

Anatolo Sidorov, S-Peterburgo



Renkontiĝo kun Mikaelo Bronŝtejn.

Li koncertis en ekshotelo "BASE CAMP" la 26-an de februaro 2020. Liajn popularajn kaj novajn kantojn aŭskultis 12 peterburgaj esperantistoj. Fine de la renkontiĝo Bronŝtejn prezentis por la publiko siajn eldonitajn verkojn "Viv-teatro", "Mi stelojn jungis al revado" kaj en la rusa "Стареем не мы...". La libroj estis afable subskribitaj de la aŭtoro. Pri la renkontiĝo estas fotoj.

Anatolo Sidorov



Informado

Elsendo de la Berlina ruslingva televida kanalo

[Как звучит эсперанто и зачем в Германии учат искусственный язык?](https://www.youtube.com/watch?v=vbc8e24XdjI&feature=share&fbclid=IwAR1QqEwyYIQ9oqzlxVRlmdximQ1SqP1PkndWlpprCTP6dvGx8RFJaBnpeQ)

<https://www.youtube.com/watch?v=vbc8e24XdjI&feature=share&fbclid=IwAR1QqEwyYIQ9oqzlxVRlmdximQ1SqP1PkndWlpprCTP6dvGx8RFJaBnpeQ>



BELARTAJ KONKURSOJ DE UEA 2020: PARTOPRENU ĜIS LA 31-A DE MARTO

De la *Alvoko al partopreno en la 71-a okazigo de la Belartaj Konkursoj de UEA* (aperinta en la revuo Esperanto, novembro 2019*) UEA rememorigas, ke la limdato por partopreni estas la 31-a de marto 2020.

La kompleta alvoko legeblas ankaŭ en la reta revuo: https://revuoesperanto.org/belartaj_konkursoj_2020.

Ĉu nia komunumo superos en tiu 71-a okazigo de la konkursoj la rekordon de 171 altkvalitaj kandidataj verkoj atingitan pasintjare? Artemuloj estas kuraĝigataj sendi siajn verkojn por la jenaj branĉoj:

- Poezio (maksimuma longo ne fiksitaj);
- Prozo (maksimuma longo 200 x 65 signoj/kvino da paĝoj);
- Prozo, subbranĉo Mikronovelo (maksimuma longo 100 vortoj; aljuĝata estas nur unu premio, kiu nomiĝas Premio Paula Adúriz);
- Teatraĵo (maksimuma longo ne fiksitaj);
- Teatraĵo, subbranĉo Monologo (unu-persona teatraĵo) aŭ Skeĉo (unu- aŭ divers-persona) (por ambaŭ daŭro inter 10 kaj 15 minutoj; aljuĝata estas nur unu premio, kiu nomiĝas Premio María Cuevas);
- Eseo, teme ligita kun Esperanto aŭ kun la kongresa temo de la 105-a Universala Kongreso (proksimuma longo 400 x 65 signoj/deko da paĝoj; la unua premio nomiĝas Premio Luigi Minnaja);
- Infanlibro de la Jaro (originala aŭ tradukita libro por infanoj presforme aperinta en 2019; aljuĝata estas nur unu premio).

Oni rajtas sendi maksimume tri konkursaĵojn por sama branĉo aŭ subbranĉo. La rezultojn oni anoncos kadre de la 105-a Universala Kongreso (UK) de Esperanto en Montrealo (Kanado), sed partopreno estas libera al ĉiuj kaj ne ligita al aliĝo al la UK. La konkursaĵoj devas esti neniam antaŭe publikigitaj en ajna formo, krom en la branĉo Infanlibro de la Jaro.

La absoluta limdato por ricevo de konkursaĵoj estas la 31-a de marto 2020. Oni sendu po unu tajpitan ekzempleron de ĉiu konkursaĵo – krom en la branĉo Infanlibro – al Belartaj Konkursoj de UEA, ĉe la Sekretario, Miguel Gutiérrez Adúriz, prefere retpoŝte al la adreso: sciosfero@gmail.com; aŭ, se tio ne eblas, papere al la adreso: los Coteros 1-C, 2 Izda, 390600 Muriedas; Cantabria; Hispanio, indikante la elektitan pseŭdonimon por gardi la anonimecon de la aŭtoro. Por la branĉo Infanlibro oni sendu unu ekzempleron de la koncerna libro al la adreso de la Sekretario kaj tri ekzemplerojn al Ionel Oneț, Centra Oficejo de UEA, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando.

Premioj varias de 104 € al 546 €. Kompletaj informoj troveblas en la originala alvoko. Detala regularo troviĝas en la retejo de UEA: https://uea.org/teko/regularoj/belartaj_konkursoj. La premiolistoj ekde la komenco de la Belartaj Konkursoj en 1950 troviĝas ĉi tie: <http://esperanto.net/literaturo/bk/index.html>.

Por aliĝi al la 105-a UK favorpreze ĝis la **31-a de marto**, aliru: <https://uea.org/kongresoj/alighilo>. Por (re)membriĝi en UEA kaj/aŭ aboni la revuon Esperanto: <https://uea.org/alighoj/alighilo> aŭ <https://uea.org/alighoj/abonilo>. Por donaci por la Belartaj Konkursoj: <https://uea.org/alighoj/donacoj/belarto>.

Ĉiuj premiitaj verkoj de la konkursoj aperas en la serio Belarta Rikolto ekde 2013. Por aĉeti la eldonon de 2019 aliru: <https://katalogo.uea.org/katalogo.php?inf=9749>. Por aliaj jaroj:

<https://katalogo.uea.org/katalogo.php?retrovo=belarta+rikolto&trovu=Trovu+en+la+reta+katalogo>.

UEA deziras sukceson al ĉiuj kandidatoj!

Gazetaraj Komunikoj de UEA, N-ro 854. 2020-03-10

Poezio el ĉiuj ĉieloj: sesa fojo 2020



Konkurso pri poemoj en Esperanto kaj la itala lingvo

SEN PARTOPREN-KOTIZO

AJNA POEMTEMO ESTOS AKCEPTITA

KIU RAJTAS PARTOPRENI

Ĉiuj poetoj, el nia planedo.

LINGVOJ

La versaĵoj povos alveni en la itala lingvo, en Esperanto, aŭ en ambaŭ lingvoj.

KIAMANIERE ONI PETAS PARTOPRENI

La poetoj devas partopreni per nur unu poeziaĵo ne pli longa ol 50 (kvindek) versoj entute.

– Oni sendu ĝin, kune kun la aliĝilo, per retpoŝto al: samideano@hotmail.it

Elŝutu la aliĝilon en formato DOC [ĉi tie](#).

– Aŭ, Kara Aŭtoro, bonvolu plenigi la formularon en la paĝaro: <https://www.iconcorsidisamideano.it/poezio-el-ciuj-cieloj-sesa/>
La verkoj devos alveni antaŭ la 30-a de aprilo 2020.

Al ĉiuj partoprenantoj, Samideano sendos la verkaron en pdf, kiam ĝi estos preta kaj eldonita.

REALIGO DE LA LIBRO

La juĝantaro elektos la plej belajn versaĵojn (50), kaj ili konsistigos interesan poezian kolekton el ĉiuj latitudoj, laŭ koroj kaj mensoj de nia planedo.

La poemoj, kiuj alvenos en la itala lingvo, estos tradukitaj al Esperanto de konata esperantisto kaj itala poeto.

La poemoj, kiuj alvenos en Esperanto estos tradukitaj, al la itala lingvo, de alia esperantisto, itala poeto.

En la eldonita libro, do, la sama poemo estos legebla en du lingvoj: sur la dekstra paĝo en la itala lingvo, sur la maldekstra en Esperanto.

La premiada ceremonio okazos en la salonego de klasika liceo “Maurolico” en Mesino (Sicilio, Italio), la 18-an de oktobro 2020, je la 4-a horo posttagmeze.

Unua premio: Plato, unu ekzemplero de la realigita libro “Poezio el ĉiuj ĉieloj, kvina fojo”, unu ekzemplero de la romano “Kiu konis sinjoron Bosko Nedelkoviĉ?” de Samideano.

Dua kaj tria premio: Plato, unu ekzemplero de la eldonita libro “Poezio el ĉiuj ĉieloj, kvina fojo”, unu ekzemplero de la romano “Kiu konis sinjoron Bosko Nedelkoviĉ?” de Samideano.

Speciala premio: Esperantista Sicilio premios la plej belan el la poemoj alvenintaj, en Esperanto aŭ en la itala lingvo, kiu temas pri sociala malkomforto kaj ĉia opreso. **Plato**. Unu ekzemplero de la eldonita libro, unu ekzemplero de la romano “Kiu konis sinjoron Bosko Nedelkoviĉ?” de Samideano, pergamento atestanta la honormembrecon en Esperantista Sicilio.

Speciala premio Samideano: por la plej bela soneto, en Esperanto aŭ en la itala lingvo. **Plato**. Unu ekzemplero de la eldonita libro, unu ekzemplero de la romano “Kiu konis sinjoron Bosko Nedelkoviĉ?” de Samideano.

En la unuaj tagoj de septembro 2020 ĉiuj partoprenantoj estos informitaj per retpoŝto, pri kiam la rezulto estos publikigita en ĉi tiu retejo.

La membroj de la Juĝantaro estas: Giuseppe Campolo – verkisto, esperantisto, (sekretario), Anna Maria Crisafulli Sartori – literatura kritikisto, ĵurnalistino (prezidanto), Ella Imbalzano Amoroso – literatura kritikisto, kaj eminentaj esperantistoj: Renato Corsetti – verkisto, Carmel Mallia – poeto, Carlo Minnaja – historiisto kaj verkisto, Nicola Morandi – Beletristo, Luigia Oberrauch Madella – beletristo, Nicola Ruggiero – poeto.

La juĝantoj ricevos la anonimajn verkojn, kiuj estos distingitaj per numero, dum la aŭtoraj nomoj estos konataj nur al Samideano, kiu sin detenas je voĉo.

La selektado de artverkoj estos neapelaciebla.

Por klarigoj kaj helpo, bonvolu skribi al: samideano@hotmail.it

<https://www.iconcorsidisamideano.it/poezio-el-ciuj-cieloj-sesa/>

Aranĝoj

Nova MASI-aranĝo Urboj tra tempoj. Penza

Informletero № 1



Karaj geamikoj!

MEA MASI kore invitas vin al la nova maja Esperanto-renkontiĝo –Urboj tra tempoj”.

KIO. La renkontiĝo estas dediĉita ĉefe al gravaj kulturaj eventoj, okazintaj en la urbo tra ĝia historio ekde la jaro 1887 – la jaro de naskiĝo de Esperanto. Ĉi-foje nia urbo estas Penza. La aranĝo estos ĉefe turisma kaj ripoza, Esperanta parto de

la programo dependos de la aliĝintoj. Se nia nova renkontiĝo gajnos sufiĉe da entuziasmo, la partoprenantoj kune elektos alian urbon por la sekva jaro.

POR KIU. Ni ĝojus vidi ajnajn esperantistojn, el ĉiuj regionoj kaj landoj, sed realeco sufloras, ke geografie plej oportunos partopreni por homoj el la regionoj Centra (kie nestas MEA MASI) kaj Volgia (al kiu apartenas Penza, kaj en Penza ja loĝas MASianoj!). **GRAVE!** Ĉar granda (eĉ ĉefa!) parto de la programo konsistas el ekskursoj kun ruslingvaj ekskursgvidantoj, ni akceptas ankaŭ familianojn de esperantistoj!

KIAM. Ekde la 1-a ĝis la 5-a de majo 2020.

KIE LOĜI. Ni loĝos en tre komforta bela hostelo en la centro de la urbo – “Nice-hostel” (u. Penza, str. Sverdlova, 49) <http://www.nicehostelpenza.ru/>, la prezojn vi povas mem vidi en la paĝaro. Ni rezervis du ĉambrojn po 8 litoj (viran kaj inan) kaj 2 – por paroj. Apud la ĉambroj estas multe da spaco por kunveni.

KIE MANGI. Kiel en ĉiuj hosteloj, ankaŭ en “Nice” estas kuirejo por memservo. Sed ĝin ja uzos la tuta loĝantaro de la hostelo. Pli senzorge ni manĝos en studenta manĝejo – “Универ58”, kiu situas 10-minutan piediradon de nia hostelo, liveras bongustajn manĝojn kaj kompleksajn tagmanĝojn kontraŭ 250 r. Tamen plej ofte ni tagmanĝos kaj vespermanĝos en la urbo – antaŭ aŭ post la ekskursoj.

KIE EKSKURSI. Ni piediros al: Domo de popola kreado (300 m), Penza zooparko (390 m), pentrajgalerio K. A. Savickij (1,1 km), parko V. G. Belinskij (1,5 km), vizitos Muzeon de unu bildo G. V. Mjasnikov, Regionografian muzeon, Muzeon de V.O. Kljuŝevskij, botanikan ĝardenon kaj skulptajparkon – “Legendo”.

KIO EN LA PROGRAMO. Dum la tempo, libera de urbovizitoj, en nia hostelo pasos programo en Esperanto: prelegoj laŭ la temo de la renkontiĝo, konversaciaj rondoj, intelektaj kaj psikologiaj ludoj, poezia horo, tabloludado, –Homlupoj” ks. Vespere ni nepre vizitos teatraĵojn aŭ filharmonion.

KIOM kaj KIEL PAGI. La loko en 8-lita ĉambro kostas 700 rbl diurne. Por viaj manĝoj vi mem pagos en manĝejoj. Biletoj por muzeoj kostas 100-150 rbl, por teatroj – 500-600 rbl. Ni aĉetos teatrajn biletojn anticipe – tiam ni petos sendi monon por ili. Aliĝkotizo estas 500 rbl por la tuta periodo.

KIEL ALIĜI. Por aliĝi simple tuj skribu al Mirina. Tio multe gravas por rezervi ĝuste por vi la lokojn en la hostelo!

KIE INFORMIĜI. Por la nova aranĝo estis kreita grupo en la socia reto – “V Kontakte”, kien ni klopodos meti ĉiujn organizajn kaj programajn novaĵojn. Vi estas invitataj tien kun viaj demandoj kaj proponoj! <https://vk.com/urbojtratempoj>

Telefonu kaj skribu al Mirina (Irina Gonĉarova): +7-905-7966199, mirinda.strigo@gmail.com, https://vk.com/mirinda_strigo

kaj al Ilja (Penza):
gnusarev@inbox.ru
<https://vk.com/id558362403>

Nun rapidu aĉeti la biletojn al Penza kaj reen! Ja estos majaj festoj!
Plenestime kaj antaŭguate la renkonton –
viaj MASianoj

Rusiaj Esperanto-Tagoj

«Siberio invitas vin!»

Dua informilo

Karaj aliĝintoj kaj eventualaj aliĝontoj al RET-2020!

Jam venis la kalendara printempo. Baldaŭ ni devas antaŭpagi la loĝadon en nia bazejo «Brusnika» kaj la flosadon. Ankaŭ la aliĝkotiĝo bezonatas por organizaj aferoj.

Loĝantoj de Siberio ĉiusemere asekuras sin de iksodoj. La asekura firmao de Krasnojarsko, kie laboras unu nia esperantisto, proponas por ni fari asekurojn, kiuj validas unu jaron tra la tuta teritorio de Rusio.

Bonvolu ĝiri al **Aleksandro Lebedev** vian monon.

Sberbanka karto: 5469 3800 7074 4643,

aliaj pagmanieroj: vidu ĉe http://reu.ru/paghoj/pagmanieroj_co.html.

Samtempe **nepre informu** lin per email amikko@yandex.ru pri pri via nomo, kotizo kaj celo de via ĝiro.

1) Bonvolu pagi la **aliĝkotiĝon** 1300 rublojn (REU-membroj) aŭ 1500 rublojn (ĉiuj ceteraj) **ĝis la fino marto**. Por eksterlandanoj la aliĝkotiĝo estas 25 €.

2) **Monon por loĝado** (50%) bonvolu ĝiri **ĝis la 15-a de majo**. La prezo estas 1550 rbl / persono / nokto kaj inkluzivas noktadon kaj 3-fojan manĝadon.

3) Al **Evelina Sokolova** bonvolu ĝiri monon por **flosado** (se vi partoprenos ĝin) kaj **asekuro kontraŭ iksodoj**.

Ŝia karto jenas: 5336 6900 1424 2442 (Sberbank). **Bonvolu skribi NENION en la linio «naznaĉenie plateja».**

Mesaĝu al ŝi per email sevelina@mail.ru la nomon, sumon kaj celon de via pago.

La **flosado** kostas 4500 rublojn, tio inkludas tendon, kuiristan laboron, dormosakon, tapiŝon, manĝadon, buson al la flosloko de la E-klubo. Bonvolu **gis la 15-a de aprilo ĝiri** tiun sumon!

Pri **asekuro**. Ĝi kostas 300 rublojn por plenkreskulo kaj 250 rublojn por infano. Se pagi 500 rublojn, tiu sumo antaŭvidas medicinan helpon kaj kuracadon kontraŭ ebla akcidento. Bonvolu decidi mem pri la sumo.

Aldone bonvolu sendi al **Elena Ŝaravina** frambo@yandex.ru (aŭ al **Svetlana Smetanina** svsmetanina@yandex.ru) donitaĵojn de via rusia pasporto + adreson. Por asekuro eblos ĝiri monon la plej malfrue **fine de majo**.

Pri viaj aĵoj dum la flosado. Kelkaj demandis, kion fari kun eventualaj pakaĵoj, kiuj ne estos bezonataj dum la flosado. Do, antaŭ la flosado vi povos restigi ajnajn viajn aĵojn en Krasnojarsk en la klubejo de Esperanto-klubo KRESKO. Al la flosado vi prenu nur la plej necesan minimumon da aĵoj! Ĉion ceteran lasu en la klubejo! Organizantoj zorgos pri transporti vian bagaĝon el la klubejo al la bazejo, kien vi venos fine de la flosado.

Se aperos demandoj aŭ iuj hezitoj, bonvolu turni vin telefone aŭ rete al Aleksandro Lebedev kaj Svetlana Smetanina. Dankon pro komprenemo kaj rapidaj ĝiroj!

Bonvenon al RET-2020!



“Ponto” [Bulteno de REU (BdR)] estas oficiala informilo de la tutrusia socia organizaĵo
“RUSIA ESPERANTISTA UNIO”

La revuon aŭtomate ricevas ĉiuj membroj de REU, ĉiuj ceteraj povas aboni ĝin ĉe la Estraro kontraŭ 250 r. jare.

“Ponto” atendas viajn lokajn, regionajn novaĵojn! Bonvolu sendi ilin al Nikolao Gudskov nikolao@yandex.ru
aŭ (kaj) Svetlana Smetanina svsmetanina@yandex.ru

Estraro de Rusia Esperantista Unio